

Ora Ĵurnalo

ĴURNALO, KIU NE APERAS ĈIUTAGE, SED LEGEBLAS ĈIUTAGE

Numero 89, Novembro 2025



La iama stacidomo en Särö.

Magazino por kulturo kaj plezuro

Bonvolu viziti nian retpaĝon:

www.esperanto-gbg.org

Enhavo

Enhavo.....	2	Visst är det roligt med Halloween	13
El "Världens bästa ordspråk"	2	Haloveno.....	14
Pri Ora Ĵurnalo.....	2	Halloween	14
Espeporko meditas.....	3	Memoraĵoj pri Haloveno, <i>Lasse Granat</i>	15
Pri la frontbildo	3	Proverboj pri bestoj	16
La tenisa reĝo en Särö	4	El 57:a Korea Kongreso	17
Tenniskungen på Särö	4	Trafikakcidento, <i>Josef Kříž</i>	17
Memoroj pri Ingrid Vallin, membro de la Esperanto-Societo de Gotenburgo.....	5	Kiel sperti Lumojn en i Alingsås?	17
Minnen av Ingrid Vallin, medlem i Göteborgs Esperantoförening.....	5	Hur man kan uppleva Ljus i Alingsås.....	17
Interesa prelego pri Ferenc Szilagyí	7	Tidskriftsverkstan 20 november	19
Poemoj de Artur Dron'	9	Aŭkcio de Esperanto-Steloj 2025–11–13, <i>Renate kaj Walter Klag</i>	20
Ĉio ŝanĝiĝis ĉe la Orienta fronto, <i>Arturo Dron'</i>	10	Gotenburgo kun ĉiuj ĝiaj terposedaĵoj – la verda urbo kiu malaperis	21
Pri Arturo Dron', <i>Viktoro Pajuk</i>	12	Landeriernas Göteborg – den gröna staden som försvann.....	21
Haloveno certe estas amuza	13		

El "Världens bästa ordspråk" (La plej bonaj proverboj de la mondo)

Se vi tro insistas, ke vi pravas, vi malpravas (*hinda*).

Tiu, kiu bonkore donacas, riĉigas sin mem (*persa*).

Gaja koro malofte oscedas (*islanda*).

Pli bone saluti unu fojon tro multe, ol diri tro multe (*ĉina*).



Pri Ora Ĵurnalo

Ora Ĵurnalo estas eldonata de Esperanto-Societo de Gotenburgo por subteni la esperantobibliotekon en Stannum, Östadsvägen 68.

Redaktantoj: Siv Burell, 070-721 34 79, siv.burell@gmail.com kaj Ingegerd Granat, 073-502 53 32, ingegerd.granat@gmail.com. Fina paĝarangō: Andreas Nordström, arendsian@hotmail.com.

Limdato por manuskriptoj estas la 1:a en ĉiu monato. Ni deziras kontribuaĵojn pri kulturo, naturo, lingvo, vivstilo, sano, manĝaĵo kaj rakontoj en diversaj temoj.

Ora Ĵurnalo n-ro 89 ankaŭ troviĝas en versio por la poŝtelefono ĉe

www.esperanto-gbg.org/89



Espeporko meditas



- ♦ Ĉiun jaron oni diskutas, **ĉu decas festi Halovenon lige al la Tago de ĉiuj sanktuloj**. Haloveno estas tago de timego kaj petolaĵoj. La Tago de ĉiuj sanktuloj estas tago por memori la forpasintajn parencojn kaj amikojn. Erare oni diras ke la halovena festo origine venas de Usono! Nun vi povas legi pri la origino de Haloveno kaj pri eksterordinara mask-kostumo!
- ♦ La 18an de oktobro ni bonvenigis **Ann-Louise Åkerlund**, kiu faris interesan **prelegon pri Ferenc Szilágyi**. Unu el la aŭskultantoj estis **Erika Kristensson**, kiu havas proprajn memorojn pri la hungara paro Szilágyi, kun kiu ŝia familio interrilatis. Eble venos artikolo de ŝi por la decembra numero de Ora Ĵurnalo. Ni esperu!
- ♦ Per la novaĵaj medioj ni aŭdas pri Ukrainio. Niaj ĵurnalistoj raportas. Tamen pli bonas se iu kiu mem spertis la minacon de misiloj kaj dronoj raportas. En ĉi tiu numero ukraina ĵurnalista, kiu nun batalas en la orientaj regionoj, sciigas nin pri la sentoj de soldato. Legu pri **Arturo Dron'**!
- ♦ Memorojn pri **Ingrid Vallin**, membro de la esperanta klubo de Gotenburgo, mi

volas dividi kun vi. Ŝi forpasis la 28an de septembro. La kvar nepinoj partoprenis la enterigan ceremonion, kreante delikatan etoson, simile al tia, kian Ingrid disvastigis.

- ♦ Pri Gotenburgo **Ingegerd Granat** lerte instruas nin. Se vi volas informi ne-gotenburganojn pri la urbo, vi facile trovas materialon en Ora Ĵurnalo. Ĉi tiun fojon temas pri terposedaĵoj kaj la verda urbo, kiu malaperis. Pri nia "tenisa reĝo" Gustavo la kvina, kiu neniam perdis eĉ unu maĉon, ŝi nun skribis.
- ♦ Lumoj en Alingsås – aŭ angle **Lights en Alingsås** – kiun nomon la aŭtoritatoj preferas, finiĝis la 2an de novembro post unu monato kun multaj vizitantoj. Eble bonas la angla titolo, ĉar la dekoraciantoj de la miriga lumigado de arboj, riveroj, domoj kaj placoj venas el la tuta mondo. La ĉi-jara ekspozicio havis filmtemon.
- ♦ Mi pensas ke **novembro estas la plej trankvila monato** de la jaro, sen postuloj fari multon. Oni kolektas forton por decembro, ĉu ne?

Ĝis decembro!

/Siv

Pri la frontbildo

La unutraĵa relvojo Säröbanan (GSJ) iris inter Gotenburgo kaj Särö, sude de la urbo, inter 1903 kaj 1965. Nuntempe biciklovojo, 24 km.

Särö havis riĉan loĝantaron kaj en la malnova tempo la unuaklasa vagono havis imititaĵon de orita ledo kiel tapetojn kaj kandelojn en

facetitaj laternoj. La superklasaj sinjoroj havis siajn konstantajn sidlokojn en la salono. Kiam la reĝo Oscar II foje iris per la linio, oni uzis du lokomotivojn por esti certa.

En la someroj oni aranĝis vagonarojn por bangastoj al la ĉe-mara banloko en Askim.

El Wikipedia

La tenisa reĝo en Särö – Tenniskungen på Särö

de Ingegerd Granat

La reĝa epoko en Särö komenciĝis en 1887 kiam reĝo Oskaro la 2-a kaj kronprinco, kiu poste fariĝos reĝo Gustavo la 5-a, vizitis Särö-n sur la reĝa jakto "Drott".



Tamen, en 1907 kronprinco Gustavo alvenis per trajno kaj oni povas mencii, ke li pasigis 35 somerojn tie. Li fariĝis reĝo en novembro 1907.

Li ludis tenison kaj laŭ la onidiroj li neniam perdis matĉon.

Gustavo la 5-a estis granda mecenato de teniso kaj en 1926 li ludis kontraŭ la maharaĝo de Kalsia. Nu, la tenisejo en Särö certe havas multajn glorajn memorojn.



Den kungliga epoken på Särö började 1887 då kung Oscar II och kronprinsen, som senare skulle bli kung Gustaf V, besökte Särö på kungayachten "Drott".

1907 ankommer dock Kronprins Gustaf med tåg och det kan nämnas att han tillbringade 35 somrar där. Kung blev han i november 1907.

Han spelade tennis och enligt ryktet förlorade han aldrig en match.



Gustaf V var tennissportens store beskyddare och 1926 spelade han mot maharadjan av Kalsia. Jo, visst har tennisbanan på Särö många ärofulla minnen.

La reĝo ludis tenison en Särö ĝis 1946, kiam li estis 88-jaraĝa.

Dum sia tempo, Gustavo la 5-a estis kaj laŭdata kaj kritikata. Li mortis en 1950 kaj poste sekvas alia rakonto...

Kungen spelade tennis på Särö fram till 1946 då han var 88 år gammal.

Gustaf V var under sin tid både hyllad och omstridd. Han dog 1950 och sedan följer en annan historia ...

Memoroj pri Ingrid Vallin, membro de la Esperanto-Societo de Gotenburgo

Minnen av Ingrid Vallin, medlem i Göteborgs Esperantoförening

Ŝi forpasis en 28 septembro 2025.
Ŝi mankas al ni!

Hon gick bort 28 september 2025.
Hon saknas oss!



La gotenburgaj esperantistoj memoras Ingrid kiel ĝojan, intereseman kaj afablan personon.

Dum multaj jaroj mi loĝis en la sama kvartalo kiel Ingrid kaj la edzo Åke, kaj ni ofte renkontiĝis.

Dankon pro nia amikeco, Ingrid! Dankon pro ĉiuj bastonetpromenoj, liniaj dancoj, akvaj aerobikoj, multe da sandviĉfarado ĉe Pensionärspoolen (peranto de laboretoj por pensiuloj), kantaj ekzercoj kun Gråbo sångare kaj precipe ĉiuj esperantaj eventoj! Vi iris antaŭ mi al alia mondo, sed mi venos poste, kiam la tempo venos. Ĝis revido!

Siv Burell

En junio 2018, kvar polaj esperanto-parolantoj venis al Svedio por helpi nin pri la somera esperantokurso. En septembro, naŭ personoj, i.a. Ingrid, el la esperantoklubo en Gotenburgo vizitis la esperantoklubon de la urboj Gdansk, Sopot kaj Gdynia: **Torento**. Jen ni antaŭ la

Göteborgs-esperantisterna minns Ingrid som en glad, intresserad och vänlig person.

Under många år bodde jag i samma radhusområde som Ingrid och maken Åke och vi träffades ofta.

Tack för vår vänskap Ingrid! Tack för alla stavgångs-promenader, linedance, vattengympa all smörgås-beredning hos Pensionärspoolen, sångövningar med Gråbo sångare och framför allt alla esperantoevent!

Du gick före mig till en annan värld, men jag kommer efter, när det är dags. Vi ses!

Siv Burell

I juni 2018 kom fyra polska esperantister till Sverige för att hjälpa oss med sommarkursen i Esperanto. I september besökte nio personer, bl.a. Ingrid, från esperantoklubben i Göteborg esperantoklubben för städerna Gdansk, Sopot och Gdynia – **Torento** (= fors). Här står vi

mara dio Neptuno – la ekvivalento de nia Pozidono.

framför havsguden Neptunus –
motsvarigheten till vår Poseidon.



Ni estis invititaj al "Esperanto sur la strando 2018". En Ora Ĵurnalo n-ro 11, oktobro 2018 vi povas legi pli pri la vojaĝo al Pollando. Ĝi estas havebla en la retejo de la gotenburga esperantoklubo www.esperanto-gbg.org.

Vi inbjöds till "Esperanto på stranden 2018". I Ora Ĵurnalo nr 11, oktober 2018 kan man läsa mer om Polenresan. Den finns på esperantoföreningens hemsida www.esperanto-gbg.org.



Agado, kiun Ingrid vere ŝatis, estis **Gråbo sångare**, malgranda koruso, kiun orgenistino Hanna Engberg startis. Tie ni kantis en la sveda

En aktivitet, som Ingrid verkligen gillade, var **Gråbo sångare**, en liten kör, som orgnisten Hanna Engberg startat. Där sjöng vi på svenska

aŭ angla lingvoj – ne en Esperanto. Ni spektis la klasikan filmon Sono de muziko kaj poste prezentis kantojn el la filmo por aliaj maljunuloj, kiuj dum la sezono havis 75, 80, 85, 90, 95 aŭ 100 jarojn. /Siv

eller engelska – inte på esperanto. Vi såg den klassiska filmen Sound of Music för att sedan framföra sånger ur filmen för andra pensionärer, som under terminen fyllt 75, 80, 85, 90, 95 eller 100 år. /Siv



Interesa prelego pri Ferenc Szilagyí

de **Ann-Louise Åkerlund** ĉe la gotenburga klubo en Redbergsskolan la 18an de oktobro. Ingegerd fotis, Siv skribis.



Kiam mi legis La Folio-n, la membrokomunikilon de la esperantoklubo de Malmö, mi vidis artikoleon pri prelego, kiun Ann-Louise faris en la klubo. Bone legi komunikilojn de aliaj kluboj, oni kaptas ideojn. Kompreneble ni en Gotenburgo volis ke Ann-Louise faru la saman prelegon pri

Szilagyí dum multaj jaroj loĝis en Borås, la familioj interrilatis.

Eble venos artikolo de Erika en la decembra numero de Ora Ĵurnalo.

El la prelego de Ann-Louise:

Ferenc Szilagyí (1895–1967) naskiĝis en Budapeŝto, sed en la 30-aj jaroj li fariĝis sveda civitano.

Li estis oficisto, doktoro pri juro, verkisto kaj redaktoro. Li esperantiĝis en la jaro 1924



Erika Kristensson.

Ferenc Szilagyí ĉe ni.

Krome, en nia klubo membras Erika Kristensson, kiu havas proprajn memorojn de Ferenc Szilagyí kaj lia edzino. Kiam la paro



Ann-Louise Åkerlund.

(aŭ 1925) kaj estis tre ŝatata kursgvidanto kaj preleganto en la budapeŝtaj kluboj, kie li ankaŭ aranĝis literaturajn vesperojn. Liaj instruistaj kaj prelegistaj aktivadoj kondukis lin al vojaĝoj en pluraj landoj.

En 1932 li komencis instrui laŭ memverkita lumbildmetodo kaj de la sama tempo gvidis sukcesajn kursojn en Svedio. Dum unu jaro okazis 20 kursoj kun ĉirkaŭ 500 kursanoj, kaj 32 prelegoj, plejparte pri Hungario.

Kelkaj vortoj pri la libroj verkitaj de Ferenc Szilágyi

Mi citas el la prelego de Ann-Louise:


Szilágyi verkis poemojn sed estas pli konata kaj alte taksata kiel verkisto de noveloj kaj aliaj prozaj tekstoj. Liaj unuaj noveloj aperis en la libro "Trans la Fabeloceano", fakte ne liaj plej bonaj tiaj.



En lia dua novelaro "La Granda Aventuro", eldonita en 1945, aperis la novelo "La Liberigo de la juĝisto", kiu de la hungara lingvisto Vilmoz Benczik en 1976 estis konsiderata unu el la plej bonaj noveloj en la esperanta literaturo (ĝis tiam).

En la novelaro "Inter sudo kaj nordo" (1950) Szilágyi rakontas pri la vivo en Svedio kaj pritraktas la problemojn de vivo en fremda medio.

La kvaran novelaron "Koko krias jam" (1955), kelkaj recenzistoj konsideras la plej altan punkton de la verkista kariero de Szilágyi. En kelkaj el la noveloj li iom subkomprenite kondamnas militon kaj perforton, en aliaj li



humore rakontas pri la vivo en Svedio. Unu el miaj plej ŝatataj partoj temas pri lia amiko Aleksandro, kiu tute neatendite spertis teruran decembran nokton en bieno en

Vermlando. Li travojaĝis Svedion por fari kursojn kaj prelegojn kaj post malfacila tago la 12-an de decembro kun multe da laboro li estis tre laca. Szilágyi rerakontas la sperton de Aleksandro en tre humora maniero.



"Mistero minora" (1958) estas lia lasta verko kaj lia sola romano. Ĝi estas krimrakonto kies nivelo laŭ Vilmoz Benczik superas la averaĝon de similaj verkoj en esperanto. Ĝi povas en certa maniero esti konsiderata kiel resumon de liaj antaŭaj verkoj, kiujn ĝi ankaŭ iomsence mokas. En la romano Szilágyi uzas la dramatikajn metodojn de filmo kaj radio.

Sten Johansson, sveda verkisto taksas Szilágyi:n unu el la ĉefaj stilistoj en la esperanta prozo dum ĉiuj epokoj.



Poemoj de Artur Dron'

Pluvivu l' Am' ĉe l' fina lim',
simila al
rubusa viv'.
Sergenta sindonec'.
Infana, hunda, kora.
La ploro – ĝin
mi ne elploru.

Videblas lim',
skizeblas klara spur'.
Tenadi limojn
en konkorda tono.
Kaj resti en oktobro sen futur'.
Laŭ la ordono.

Ĉar tiu Am',
malakro de tranĉil',
amara Am',
jam fariĝanta via,
sur tiuj tenas sin,
estantaj sur la lim'.
Kaj tiuj,
trans la limo.



Kiam ni demetas niajn kirasveŝtojn,
kaskojn, pizmantelojn, jakojn, gantojn,
kaj manĝas mandarinojn apud la ferhejtilo,
kaj similiĝas al infanoj,
foje mi pensas,
ke vi estas ie en la najbara ĉambro.

En la vilaĝo
iu el lokaj virinoj
diris al infano:
"Fileto."

Sed ĉiu el ni
retrorigardis.



Mi vidis, ke la vazo kun freŝaj floroj
falis.
"Mi tuj ordigos," mi diris
al la foto sur la kruco.

Mi levis la vazon, kaj tie
estis letereto:
"Leporeto, feliĉan datrevenon al ni.
Mi amas vin."

Elukrainigis **Petro Palivoda**



Ĉio ŝanĝiĝis ĉe la Orienta fronto

de Arturo Dron'

La skota ĵurnalisto Giles Sutherland venis al Lvivo la 23-an de novembro por paroli kun ukrainaj verkistoj. Mi estis ferianta, do ankaŭ mi akceptis la inviton renkontiĝi. Katerina Miĥalicina kaj mi matenmanĝis kun Giles kaj parolis pri la plena rusa invado kaj literaturo pri la militoj en Eŭropo. La ĵurnalisto estis tre subtena al ni, volis helpi laŭeble. Lia alveno mem jam estis ago de lukto, ĉar la skoto honeste konfesis, ke iri al Ukrainujo estis timiga. Li diris, ke li aliĝus al nia armeo se li estus pli juna, sed je sesdek jaroj li ne estus multe helpema al la armeo.

De la hotelo ni piediris al la lokoj de honoraj enterigoj en Lvivo. Survoje ni daŭre parolis pri militoj kaj libroj, sed la konversacio atingis senelirejon. En la rimarkoj de nia amiko, enŝoviĝis vortoj pri la "milito de Putino", la suferado de ambaŭ popoloj, la divido de teritorio fare de politikistoj. Mi ne memoras ĉion, kion li diris laŭvorte, sed mi ja memoras la emociion de iritiĝo kaj kolero leviĝanta en mia gorgo. Kiel tia sincera deziro helpi nin povas esti kombinita kun tia sincera manko de kompreno pri tio, kio okazas al ni?

"Giles, ili seksperfortas infanojn".


Ni nomas la rusojn orkoj aŭ porkohundoj ĉar la lingvo mem rezistas nomi ilin homoj. Kaj Giles demandas kial ni senhomigas la malamikon.

"Ili senhomigis sin per tio, kion ili faras," – respondis Katerino.

Mi havas malmultan sperton pri komunikado kun fremduloj. Mi ne estis eksterlande, krom vojaĝoj al Varsovio por viziti mian patrinon antaŭ 6 jaroj. Mi ne partoprenis publikajn diskutojn, mi ne vizitis eksterlandajn librofoirojn. Sed mi havis ĉi tiun konversacion kun Giles Sutherland. Kaj ĝi fariĝis por mi

konversacio kun la intelektuloj de Eŭropo. Kun kleraj homoj, kiuj tiom dediĉas sin por helpi nin kaj kiuj tiom profunde ne zorgas pri tio, kio okazas en ĉi tiu kripla peco de Eŭropo. Mi diris al Giles tion, kion mi dirus al ĉiuj eŭropaj intelektuloj, se mi havus la ŝancon.

Ne endas mezuri nian militon por supervivo laŭ la du mondmilitoj. Ili lasis la plej grandan militistan spuron en la kolektiva memoro. La plej forta, pinta literaturo pri milito estas libroj pri la Unua Mondmilito unue, kaj poste pri la Dua Mondmilito. Sed sufiĉas mezuri ĉion laŭ Remarques-oj, Hemingway-oj aŭ Jünger-oj. Eĉ laŭ Vonnegutoj kaj Haŝekoj. Ĉar ili ĉiuj pezigis nin. Ili ankaŭ ŝajnis al ni la pinta literaturo ĝis ni ricevis nian militon pro ekzisto. Kaj nun multaj ukrainoj ne povas legi ilin, ĉar ili ne temas pri ni. Okazis, ke la pinta literaturo pri milito ne vere diras al ni ion ajn pri la milito, en kiu ni mem vivas kaj mortas.



*Kovrilo de la Esperanta traduko:
Köln, Heroldo de Esperanto, 1929*

Mia unua renkonto kun Remarque okazis en 17-a jaraĝo. Mi pensis, ke "En okcidento nenio nova" estis la plej potenca libro iam verkita. Mi memoras unu el la epizodoj, kiuj plej frapis min. La ĉefrolulo, germana soldato

nomita Paŭlo, trovas sin en la sama tranĉeo kiel la malamiko. Pelitaj de adrenalino, timo kaj kolero, ili batalas, kaj Paŭlo mortigas la alian soldaton. Li enspiras profunde, trankviliĝas, kaj poste elprenas la dokumentojn de la murdito, ekscias lian nomon kaj familian nomon, ekzamenas foton de lia edzino. La malamiko fariĝas specifa persono por Paŭlo, li alparolas lin laŭnome, pardonpetas, diras, ke ili similas al li, preskaŭ samas. Paŭlo ploras kaj kompatas ambaŭ junulojn ruinigitajn de sensenca milito. Politikistoj ludas je dividado de teritorioj, dum ordinaraj junuloj estas egale mortigitaj ĉiuflanke. La heroo de Remarque jam ne sentas malamon al la malamiko. Ili ĉiuj estas perdita generacio de la samaj homoj kun malsamaj nomoj.

Tia forta kontraŭmilita literaturo. Kaj tiom fora por ni. Ukrainoj povus legi ĉi tion ĝis la 24-a de februaro 2022. Ĝis nia granda, ekzisteca milito kontraŭ la malbono mem. De tiam, ĉi tiu libro simple ne plu gravas por ni. Ĉar ni ne zorgas pri iliaj nomoj.

Kiam Rusujo atakis, ili faris krimojn kontraŭ la homaro ekde la unuaj horoj. La rusoj mortigas civilulojn ĉiutage. Ekzistas multaj kazoj, kie ili seksperfortis kaj poste mortigis patrinojn antaŭ iliaj infanoj, seksperfortis la infanojn mem, eĉ bebojn. Iliaj soldatoj starigis torturĉambrojn en lernejoj. La rusoj ekzekutas malliberulojn, detranĉas iliajn kapojn, membrojn kaj genitalojn dum ili ankoraŭ vivas, kaj simple aŭtumas la filmetojn en la interreto. Iliaj edzinoj diras, ke ili "permesas" al siaj edzoj "amuziĝi" kun ukrainaj virinoj. Kelkaj eĉ instigas tion kaj ŝercas, ke oni devas montri "kia estas rusa viro". Ekzistas multaj registroj de ĉi tiuj telefonaj konversacioj, ekzistas fotoj kaj filmetoj de la krimoj, ekzistas centoj da atestoj en la deokupitaj teritorioj.

La mondo estas tro sentema por kompreni tian skalon en 2025. Sciigu la mondon simple

jenon: ni ne zorgas pri ilia nomo. Kial ni sciu la nomon de la malamiko, kiu venis al via domo kaj mortigis vian familion? Oni povas paroli kiom ajn oni volas pri la milito de Putino, sed se soldatoj ricevas ordonon preni urbon, ili povas fari ĝin sen torturo, prirabado kaj abomenaĵoj. Sed eĉ se Putino mem persone dirus seksperforti kaj mortigi, homo ne farus tion. Kaj ili faras tion, ĉar ili povas. Pli malbone, ĉar ili volas. Eĉ pli malbone, ĉar ili ŝatas tion.

"Kial vi senhomigas viajn malamikojn?" – demandas Eŭropo.


Kaj estas pli facile kaj pli sekure por Eŭropo pensi, ke ĉio ĉi estas milito inter Putino kaj la kolonioj. Ankoraŭ unu diktatoro, kiu iam mortos, kaj ĉio iel solviĝos. Kaj la rusoj certe estas agresantoj, sed la afero estas, ke ili estas ostaĝoj de la reĝimo. En realeco, nenio solveblo per si mem. Kaj la rusoj ne estas ostaĝoj de la reĝimo, sed ĝiaj aŭtoroj.

Kian literaturon ni devus kapti en ĉio ĉi? Tio, kio antaŭe estis konsiderata la plej bona kontraŭmilita literaturo, perdis sian gravecon. Krome, ĝi povas esti malutila. Se ni ne foriras de Remarque nun, ni eble ne rekonsciiĝos, kiam la rusoj komencos paroli per liaj vortoj. Ĉu ili jam parolas? Kun la tuta amo al la germana verkisto, ni devas memori, ke li estas ĝuste germana verkisto. Kaj estas lia voĉo, la reprezentanto de la agresanta popolo, kiun la rusoj kaptas. Iam ili uzos la pozicion de Remarque pri povraj knaboj, kiuj estis trompitaj, por blankigi sin. Tiel la rusoj provos manipuli Eŭropon post sia malvenko en la milito. Ili ĉion transformos en la fakton, ke la homoj, kiuj estas bonaj en sia esenco, estis ombritaj, trompitaj kaj ĵetitaj al la buĉado fare de la kruela Putino kaj kompanio. Kaj mi timas, ke estas pli facile por Eŭropo simpatii la kompatindajn trompitajn knabojn ol la homojn, kiujn ĉi tiuj knaboj torturis...

Ni bezonas novan literaturon, kiu estos kontraŭmilita, sed ne kontraŭmilitista. Literaturo kutimas kondamni armilojn. Anstataŭe, ĝi devus apartigi tiun, kiu atakas per armilo, de tiu, kiu defendas sin per armilo. Ĉi tion plej bone komprenas ukrainoj nuntempe. Ni neniam rezignos pri la kapablo pafi, ĉar temas pri nia sekureco. Kaj nia literaturo ĉiam kondamnos la agresanton, sed neniam parolos kontraŭ armiloj. Ĉiu sana literaturo estas kontraŭmilita. Sed de nun kaj por ĉiam, la ukrainaj fabrikaj agordoj defaŭlte estos intenco kontraŭbatali, se iu komencos ĉi tiun militon kontraŭ ni.

Ni montris al Giles iom da kontraŭmilita literaturo. Ni kondukis lin al la enirejo de la Liĉakiva tombejo. Ni turnis nin dekstren de ĝi kaj alproksimiĝis al apenaŭ videbla tombo, sur kiu ankoraŭ ne estas monumento, nur freŝa kruco.

Jen, Giles, nia amikino, la ukraina verkistino Vika Amelina, kuŝas ĉi tie. Ŝi laboris je libro pri rusaj militkrimoj, por ke la mondo sciu kaj kondamnu ilin. Kaj ŝi ankaŭ trovis kaj publikigis la taglibron de la infanliteratura verkisto Volodimir Vakulenko, kiu estis torturita kaj mortigita de la rusoj la antaŭan jaron. Ŝi kuŝas ĉi tie, Giles, ĉar ŝi venigis



eksterlandajn ĵurnalistojn al la apudfronta Kramatorsko, por ke ili vidu kaj kondamnu. Tie ŝi estis morte vundita post kiam rusa misilo flugis super la strato nome de la ukraina verkisto Stus, kiu estis torturita kaj mortigita de rusoj 38 jarojn antaŭe. Ŝi mortis kelkajn tagojn poste en hospitalo – je la naskiĝtago de la ukraina verkisto Vakulenko. Kaj jen, Eŭropo, oni alportas skribilojn al ŝia tombo por verki.

*Esperantigis **Viktoro Pajuk***

Pri Arturo Dron'

Ukrainaj defendantoj estas ekstreme talentaj kaj, malgraŭ servado ĉe la fronto, sukcesas verki. Unu el ĉi tiuj batalantoj estas **Arturo Dron'** (n. 2000). Lia unua poemaro aperis deknaŭ jaraĝa, la dua je dudek du. Inter ili – la komenco de plenskala invado, interrompitaj studoj en la magistra grado ĉe la fakultato de ĵurnalismo en Lviva universitato kaj la unua sperto pri bataloperacioj, profunda vundo en oktobro 2024, kaj denove Lvivo – kuracado kaj resaniĝo. Kromnomo David – honore al la biblia Davido.

Estis nome lia poemo, dediĉita al lia falinta ĵurfrato, kiun citis la itala ĉefministro Giorgia Meloni ĉe gazetara konferenco kun la ukraina prezidanto V. Zelenskij la 21-an de februaro en Kijivo, por ke homoj daŭre skribu kaj parolu pri ĉi tiu milito eksterlande, por ke pli kaj pli da homoj lernu pri ĉio ĉi el nia kreskanta nombro da atestoj.

La poemo, kiun Meloni citis, estas dediĉita al la forpasinta O. Kobernik. **Oleksandr Kobernik (kromnomo Dok)** estis konata instruisto kaj pastro el Lvivo, psikologo, patro de 3 infanoj. Kaj li ankaŭ havis la



rangon de supera serĝento en la Armeo. "La 20-an de oktobro, dum peza tanka bombado de niaj pozicioj, mi estis ŝokita, pluraj soldatoj estis vunditaj, kaj tri, bedaŭrinde, mortis. Kaj tio estis la unua fojo, ke 'Dok' ne helpis siajn ĵurfratojn, ĉar li ne postvivis tiun bombadon", – rememoras Arturo.

La poemoj de Dron' estis tradukitaj en la italan, francan, anglan, litovan, polan, belarusan lingvojn, nun – unuan fojon esperantigitaj. Cetere, oni ankaŭ petis permeson por rusa traduko je iu poezia festivalo en Sankt-Peterburgo.

Arturo, kompreneble, rifuzis. "**Hemingway scias nenion**" (2025) estas la unua kolekto de mallonga prozo de la ukraina verkisto, "soldata atesto", arta interpreto de la milita sperto per fragmentaj tekstoj, sonĝoj kaj memoroj.

Brita eldonejo akiris la rajtojn eldoni la libron en la angla, tiel ke ĝi estos publikigita aŭtune de 2026. La **Kijiva Libro-Arsenala Foiro** anoncis la gajnintojn de la CELA-projekto kaj nun ĉapitro el la libro "**Ĉio ŝanĝiĝis ĉe la Orienta fronto**" estos tradukita en 9 lingvojn (krom Esperanto), kun la espero, ke ankaŭ kelkaj el ĉi tiuj tradukoj iam estos kronitaj per libroj.

Preparis V. Pajuk

Haloveno certe estas amuza, precipe kiam Avino Jane estas implikita, pensas Kaspian kaj Rufus. Oni ne devas esti maskita. /Siv



Visst är det roligt med Halloween, särskilt när farmor Jane är med, tycker Kaspian och Rufus. Man måste inte vara utklädd. /Siv

Haloveno – Halloween

El Interreto de Siv



Oni kredas, ke haloveno havas siajn radikojn en antikva kelta festivalo nomata Saveno. Festita la 31-an de oktobro, Saveno markis la finon de somero kaj la komencon de vintro. Bonvenigo al vintro kaj adiaŭo al somero kaj suno – kie la mortintoj estis memoritaj. Oni kredis, ke la limoj inter la mortintoj kaj la vivanta mondo malklariĝis dum Saveno, kaj homoj ekbruligis fajrojn kaj portis maskojn por fortimigi malbonajn spiritojn.

Saveno estas festata en Irlando kaj Skotlando. Ĉar la hodiaŭa haloveno fariĝis usonanigita kaj komercigita, estas facile kredi, ke haloveno havas sian originon tie, sed tiel ne estas.

Fakte, daŭris sufiĉe longe antaŭ ol haloveno venis al Ameriko, oni kredas ke ĝi estis en la 19-a jarcento post kiam milionoj da eŭropanoj migris al Ameriko en la 19a jarcento.

La nomo "Halloween" estas mallongigo de "All Hallows' Eve", kiu signifas "vespero de ĉiuj sanktuloj" en la malnova angla. "All Hallows' Eve", aŭ halloween kiel ni nomas ĝin hodiaŭ,

Halloween anses ha sina rötter i en forntida keltisk högtid som kallades Samhain. Samhain firades den 31 oktober och markerade slutet på sommaren och början av vintern. Ett välkomnande till vintern och ett farväl till sommar och sol – där man minns de döda. Man trodde att gränserna mellan den döda och den levande världen blev suddiga under Samhain, och människor tände eldar och bar masker för att skrämma bort onda andar.

Samhain firades på Irland och i Skottland. Eftersom dagens halloweenfirande har blivit amerikaniserat och kommersiellt, är det lätt att tro att halloween har sitt ursprung där, men så är inte fallet.

Faktum är att det dröjde ganska lång tid innan halloween kom till Amerika, man tror det var på 1800-talet efter att miljontals europeer migrerat till Amerika på 1800-talet.

Namnet "Halloween" är en förkortning av "All Hallows' Eve," vilket betyder "alla helgons afton" på gammalengelska. "All Hallows' Eve"

estas la vespero antaŭ la Tago de ĉiuj sanktuloj. La Tago de ĉiuj sanktuloj estas tago de memoro pri mortintaj parencoj, proksimaj familianoj kaj amikoj, kaj estas markita per kandeloj, floroj kaj reflektiloj en la tombejoj.

Estas facile pensi, ke la fenomeno de kostumiĝo por haloveno estas nova afero, kiu estis inventita en modernaj tempoj, sed fakte temas pri tradicio, kiu havas siajn originojn en la festivalo Saveno kaj la keltoj, kaj estas tio, kio estas sub la festo. Tiutempe, la indiĝenaj popoloj kredis, ke la limoj inter la homa mondo kaj la spirita mondo malklariĝas la 31-an de oktobro de ĉiu jaro, kaj ke la mortintoj kaj la vivantoj tial povas renkontiĝi. Kiel oni povus fortimigi la mortintojn kaj eviti esti rekonita? Per timigaj kostumoj kaj maskoj, kompreneble! Tiutempe, oni uzis ekzemple kostumojn faritajn el bestaj feloj kaj maskojn faritajn el bestaj kapoj.

eller halloween som vi kallar det idag, är kvällen före Allahelgonhelgen. Alla helgons dag är en minnesdag för avlidna släktingar, nära familjemedlemmar och vänner och den utmärks med ljus, blommor och eftertanke på kyrkogårdarna.

Man kan lätt tro att fenomenet att klä ut sig på halloween är en ny grej som man kommit på i modern tid, men faktum är att detta är en tradition som har sin ursprung i Samhainfestivalen och kelterna och det som ligger till grund för högtiden. På den tiden trodde ursprungsbefolkningen att gränserna mellan den mänskliga världen och andevärlden suddades ut den 31 oktober varje år, och att döda och levande därmed kunde möta varandra. Hur skulle man då skrämja bort de döda och undvika att bli igenkänd? Med läskiga kostymer och masker såklart! På den tiden använde man till exempel kostymer av djurskinn och masker av djurhuvuden.

La sekva artikolo, skribita de Lasse Granat, rakontas pri iomete stranga kostumo, kiun li iam portis dum Haloveno.

Memoraĵoj pri Haloveno

de Lasse Granat

La Vapormaŝino

Antaŭ multaj jaroj, en la 1970-aj jaroj, "Haloveno" estis nekonata koncepto por mi, male al "Ĉiuj Sanktuloj".

Mi loĝis en Gotenburgo sed ofte laboris en Stokholmo. Miaj konatoj tie estis pli malfermaj al novaj tendencoj ol mi, do ili sendis al mi inviton al "Halovena festo" en Stokholmo. Mi diris "jes" kaj ricevis iujn informojn pri tio, kio estis kutima ĉe tiaj festoj, ekzemple manĝaĵoj kaj kostumoj.

Post iom da pripensado, mi elpensis la ideon, ke mi povus esti vapormaŝina centro, male al ĉiuj nukleaj centraloj.

Granda kartona skatolo, kiu kovris la supran korpon, malgranda kartona skatolo, kiu estis

la kapo, kaj supre plene funkcia malgranda vapormaŝino, kiun mi havis kiel infano. Ĝi estis funkciigita per *meta*-tablojdoj kaj turniĝis kaj pufiĝis. Oni ankaŭ povis uzi la vaporfajfilon, kiu eligis vaporon kun hurlanta fajfilo.



La granda skatolo havis truojn por brakoj kaj kolo. La malgranda skatolo havis aperturojn por okuloj, oreloj kaj buŝo. Krome, la granda skatolo havis tabulon sur la fronto kun kelkaj ŝnuroj, unu por ĉiu funkcio, unu por ĉiu okulo, unu por ĉiu orelo, unu por kontroli la vapormaŝinon kaj unu por la vaporfajfilo. Kiel ekstra trajto, estis funelo sur la fronto, ĝi estis konektita al hoso interne, kiun mi povis kapti per miaj lipoj se iu verŝus ion, kion mi povus imagi "suĉatan en min". Klara teksta noto priskribis eblajn "lubrikaĵojn".


Ambaŭ skatoloj estis bunte ornamitaj, plus teksta strio kun la teksto "Vaporcentralo".

Kun ĉi tiu ekipaĵo en mia valizo, mi eliris sabate vespere al la malgranda antaŭurbo en suda Stokholmo. Grandaj etaĝdomoj, trankvila adventa vespero kun malpeza neĝkovraĵo. Preta por festadoj.

Mi trovis enirejon al lavejo, kiu momente estis neokupita. "Perfekte," mi pensis, mi ŝanĝos vestojn ĉi tie. Jen tio. Ĉio en sia loko, la granda skatolo, la malgranda skatolo, la vapormaŝino ekfunkciigita kaj tre zorge metita supre.

Kun la resto de miaj vestoj en sako, mi eliris per zorgemaj paŝoj kaj rekta dorso.

Iomete neĝis, do ekstere estis sufiĉe hele. Mi havis miajn palpebrojn iomete malfermitaj por vidi antaŭen. Tiam mi vidis kelkajn homojn venantajn al mi, kiuj aspektis tute teruritaj. "Haha," mi pensis, ili verŝajne pensis, ke mi estas roboto. Mi renkontis kelkajn pliajn homojn, kaj ili aspektis eĉ pli teruritaj.



Tiam mi komprenis kial. Kiam mi preterpasis antaŭan pordon kun granda vitra panelo, mi vidis mian spegulaĵon. La meta-tabletoj, kiuj funkciigis la vapormaŝinon, iom fandiĝis, la brulanta oleo fluis sur la kartonan skatolon, kiu nun ankaŭ brulis per forta flamo.

Mi levis la kartonon de mia kapo, haltigis la vapormaŝinon kaj estingis la fajron. Poste mi reŝaltis la maŝinon, remetis la kartonon kaj la maŝinon kaj tre singarde eniris la dekstran pordon, supreniris ŝtuparon kaj sonorigis la sonorilon. Estis iom da tumulto. Sed ili baldaŭ eltrovis kiu mi estas kaj verŝis la taŭgan "lubrikaĵon" en la funelon. Mi gajnis la unuan premion de kostumo.

Proverboj pri bestoj

Kiam la kato forestas, la musoj festas.

Fari el muso elefanton.

Rajdi sur ĉevalo, oni ne lernas sen falo.

Fari ursan servon.

Unu korniko vintron ne alportas (*Nederlando*).

Paseroj scias kiam maizo maturiĝas (*Afriko*). El "130 proverboj"

El 57:a Korea Kongreso


Eble estas eĉ pli malfacile por Esperanto travivi en la epoko de artefarita inteligento.....

Ankoraŭ ekzistas multaj homoj tra la mondo, kiuj flustras, legas, skribas kaj ĝuas Esperanton. Tio estas la plej granda feliĉo, kiun oni povas akiri, lernante lingvon.....

Esperanto estas la plej granda lingva eksperimento de la homaro.....

Esperanto estas lingva revolucio, kiu kreis ne nur skriban lingvon, sed ankaŭ parolatan lingvon.

/Siv, el Interreto.



Trafikakcidento


Josef Kříž sendis

Viro kaj virino koliziis en siaj aŭtoj. Ambaŭ aŭtoj estis tute detruitaj, sed neniuj vundiĝis. Post kiam la virino liberiĝis el la aŭto, ŝi konstatis:

”Ĉi tio devas esti signo de Dio, ke ni vivas.”

La viro kapjesis.

La virino daŭrigis: ”Kvankam mia aŭto estas tute detruita, ĉi tiu botelo da viskio estas tute en ordo. Mi proponas, ke ni trinku kaj festu nian transvivon,” kaj donis la botelon al la viro.



La viro kapjesis konsente, malfermis la botelon kaj trinkis duonon de ĝia enhavo. Tuj li redonis la botelon al la virino kaj diris al ŝi, ankaŭ trinki.

La virino respondis: ”Ne, dankon, mi atendos la policon.”

Kiel sperti Lumojn en i Alingsås?

Hur man kan uppleva Ljus i Alingsås

Ĉiujare, Alingsås organizas la plej grandan internacian lumfestivalon de Svedio. Kelkaj lumartistoj el diversaj mondopartoj ĉiu aranĝis sian propran areon por lumigi kaj kelkfoje ankaŭ sonigi. Dum la tuta oktobro, vi povas iri

Varje år ordnar Alingsås Sveriges största internationella ljusfestival. Ett antal ljuskonstnärer från olika delar av världen har fått var sitt område att ljussätta och ibland även ljudsätta. Under hela oktober kan man



la 2,5 km longan serpentan vojon mem aŭ kun gvidisto.

Por certigi, ke ĉiu havu la ŝancon vidi Lumojn en Alingsås, la urbo aĉetis kelkajn elektraĵojn kun spaco por du homoj sur benko antaŭ la

biciklanto. Volontuloj estis trejnataj pri manovrado de la bicikloj kaj gvidado. Maljunuloj, kiuj havas malfacilaĵojn marŝi 2,5 km, registriĝas anticipe kaj poste estas prenitaj kaj lasitaj ĉe siaj pordoj. Oni ankaŭ rajtis kunporti amikon. Magnus de la gotenburga esperantoklubo neniam antaŭe vidis Lumojn en Alingsås, do li estis memklara gasto.

Amy, kiu estis nia volontulo, estis afabla kontakto.

Kelkajn tagojn poste mi ricevis tekstmesaĝon kun fotoj, kiujn ŝi faris. Jen ŝi fotis nin sur la ruĝa tapiŝo. Kvazaŭ hazarde, la esperanta stelo videblas en la fono. Mi ne kredas, ke la koncerna lumigisto sciis, ke temas pri esperanta stelo.



vandri la 2,5 km longa slingo sur sia propra manoj aŭ kun gvidisto.



För att alla ska ha möjlighet att se Lights in Alingsås har staden köpt in ett antal elcyklar med plats för två personer på en bänk framför cyklisten. Volontärer har fått utbildning i att manövrera cyklarna och att guida. Äldre, som har svårt att gå 2,5 km, anmäler sig i förväg och blir sedan hämtade resp. avlämnade vid sina ytterdörrar. Man fick också ta med en vän. Magnus från Göteborgs Esperantoförening hade aldrig tidigare sett Lights in Alingsås, så han var en given gäst.



Amy, som var vår volontär, var en trevlig kontakt.




Oni devus viziti Lights in Alingsås dufoje en la sama jaro. La sperto estos malsama, kiam la arboj ankoraŭ havas foliojn kaj kiam ili faligis ilin. Ni havis bonŝancon pri la vetero – neniu pluvo, sed iom malvarme malgraŭ varmaj kovriloj. Kiam la veturo finiĝis, Amy diris: "Ĝis reveno venontjare!"

Några dagar senare fick jag SMS bilder som hon hade tagit. Här har hon fotograferat oss på röda mattan. Som av en händelse skymtar esperantostjärnan i bakgrunden. Tror inte att den aktuella ljussättaren var medveten om att det var en esperantostjärna.

Man borde besöka Lights in Alingsås två gånger samma år. Upplevelsen blir olika, när träden fortfarande har löven kvar och när de har fällt dem. Vi hade tur med vädret – inget regn, men lite kyligt trots varma pläddar. Då åkturen var slut, sa Amy: "Vi ses igen nästa år!"

/ Siv



Tidskriftsverkstan 20 november...



på Stadsbiblioteket i Göteborg med samma tema som årets magasin – **Gränser** – kommer att hållas den 20 november 18.00 – 19.30. Deltagare är Yvonne Ihmels, chefredaktör för

Kulturtidskriften Cora, konstnären Marie Falksten och författaren **Monika Zak**.


Välkommen dit!! Vi kommer naturligtvis att ha magasinet på plats också.

Min kommentar: Bland Tidskriftsverkstans 25 medlemmar finns **Ora Ĵurnalo** med i magasinets presentation av alla tidskrifterna. Föregående år var temat KLIMATET och då hade Ora Ĵurnalo med en artikel om SPRÅKKLIMAT.

Monika Zak har vi haft kontakt med. Dels besökte hon vår monter, dels har några av oss läst POJKEN; SOM LEKTE MED STRUTSAR, på Esperanto: La knabo, kiu ludis kun strutoj. Boken utspelade sig i Västsahara. Hennes nya bok: PUMANS DOTTER LEVER ÄN utspelar sig i en helt annan världsdel, i Nordamerika. Den finns ännu inte på Esperanto.

Kom och lyssna på Monika Zaks samtal med bibliotekarie Uno Nilsson.

/ Siv



Aŭkcio de Esperanto-Steloj 2025–11–13

Renate kaj Walter Klag informas

Esperanto Steloj Aŭkcio la 13an de novembro 2025

5000 Steloj plateno:

<https://www.dorotheum.com/de/l/9825512/>

Serio 1 Stelo ĝis 100 Steloj:

<https://www.dorotheum.com/de/l/9825515/>



Historio de la universala mono

René de Saussure [röné dö sosŭr] naskiĝis la 17an de marto 1868 en Ĝenevo. Post la studado de lingvistiko kaj matematiko li publikigis sian plej gravan verkon "Fundamentaj reguloj de la vort-teorio en Esperanto: Raporto al la Akademio Esperantista".

1907 universitata profesoro d-ro René de Saussure prezentis projekton de universala monsisistemo, kiun li nomis "Spesmilo". El la franca vorto "espèce" [espés] li formis la vorton "speso".

La renaskiĝo de Steloj

Dum FESTO 2012 en Métabief (Francio), Alexandre 'Alekcjo' Raymond venis al mi kun freneza sed interesa ideo: eldoni Esperanto-

monon. Tiutempe FESTO multe novigis, ĝi eldonis proprajn tasojn, ĉemizojn kaj pli. Dum la renkontiĝo grupo de homoj ĉirkaŭ tablo diskutis kiel aspektu la moneroj, kiom ili valoru kaj kiel ili funkciu.

Post la somero Alekcjo kontaktis pregejon de plastaj moneroj por taksi, kiom realigebla estas la ideo. La plano fine aspektis jene:

- Estu moneroj de 1, 3 kaj 10 steloj. Tio ebligas rapidan pagadon de diversaj eblaj monsumoj.
- La moneroj estu malsamkoloraj kaj malsamgrandaj, por ebligi facilan kaj rapidan uzon.
- La koloroj estu ruĝa, flava kaj verda, kaj la simboloj gufo, papago kaj krokodilo.

- La valoro de unu stelo egalas al la plej malgranda kutima elspeso en trinkejo aŭ gufujo, do unu taso da teo aŭ unu glaso da kolao.

La finaj desegnoj estis senditaj kaj po 3000 moneroj estis pregitaj en oktobro 2012. Bonŝance en la fino de oktobro okazis malgranda renkontiĝo, kiun mi kunorganizis: Klaĉ-Kunveno Post-Somera (KKPS) en Nederlando.

Ĝi estis perfekta por testi la novan monsystemon. La publiko ŝatis la monerojn, kaj sukcesis adaptiĝi al ĝia uzado. Post KKPS la Itala Esperanto-Junularo iĝis kuninvestanto de la projekto.

La originala valoro estis difinita kiel 4,2 steloj en unu eŭro. Poste la valoro estas ligita al la inflacie kompensitaj valoroj de eŭro, realo kaj zloto kun pezaj de 76%, 20% kaj 4%. Do same kiel la antaŭa stelo, tiu ĉi stelo teorie tenos sian valoron. Ekde 2012 ĝis 2017 la valoro de unu eŭro en steloj variis inter 4,040 kaj 4,581.

La steloj estas ĉefe uzataj en trinkejo de junularaj Esperanto-renkontiĝoj. Ili estas valida pagilo en KKPS 2012–2017, IJF 2013–2017, JES 2012 kaj 2017, SES kaj FESTO 2013 kaj IJK 2015.

Krome ili uziĝis en kelkaj trajnkaravanoj kaj eblas mendi ilin poŝte ĉe Alekĉjo aŭ Roĉjo. Daŭre uziĝas steloj dum ĉiu IJF (paske) kaj KKPS(aŭtune). Krome ili uziĝos dum la IJK 2020 en Nederlando.

La avantaĝoj de steloj en trinkejo estas la facila uzo, la malalta pezo relative al metalaj moneroj, kaj la fiero havi specialan Esperanto-monon. La ĉefa malavantaĝo estas la bezono interŝanĝi alian monon kontraŭ steloj en la komenco de la renkontiĝo.

La kvanto pregitaj en 2012 devus sufiĉi por uzo en eĉ la plejgrandaj junularaj renkontiĝoj. Se ilia uzo aŭ kolektado ekster la junulara movado ankaŭ kreskos, tiam dua presado estos pripensinda.

Rogier 'Roĉjo' Huurman

Gotenburgo kun ĉiuj ĝiaj terposedaĵoj – la verda urbo kiu malaperis

Landeriernas Göteborg – den gröna staden som försvann

El la Fejsbuk-grupo "Historio de Gotenburgo" de Helio Duarte, kiu estas granda kultura persono kaj konanto de Gotenburgo kaj ĝia historio.


Malfacilas imagi hodiaŭ, sed Gotenburgo iam estis ĉirkaŭita de verda zono de bienoj, ĝardenoj kaj malgrandaj domoj. Ili nomiĝis landerioj (provizora vorto ĉi tie uzata por sv. *landeri*), vorto kiu odoras je tero, laboro kaj somero. Ili situis kie la urbo finiĝis kaj la kamparo komenciĝis. Terpomoj, tabako kaj sukerbetoj kreskis sur la kampoj, kaj inter la aleoj staris domoj kun kradenestoj kaj blanke pentritaj verandoj.

La landerioj ekestis el la tero, kiun la ŝtato donis al la urbo en 1621, la tiel nomata donaca tero. Tie burĝoj kaj komercistoj rajtis lui teron,

Från FB-gruppen "Göteborgs historia" av Helio Duarte, som är en stor kulturpersonlighet och kännare av Göteborg och dess historia.

Det är svårt att föreställa sig idag, men en gång omgavs Göteborg av ett grönt bälte av gårdar, trädgårdar och små herrgårdar. De kallades landerier, ett ord som doftar av jord, arbete och sommar. De låg där staden slutade och landet började. På markerna växte potatis, tobak och sockerbetor, och bland alléerna reste sig mangårdsbyggnader med spröjsade fönster och vitmålade farstukvistar.

Med tiden försköts landiernas roll från försörjning till rekreation. De blev stadens lungor, stilla platser där man kunde höra vinden bland träden och låta hästen vila i skuggan. Under 1700- och 1800-talen växte de



konstrui domojn, planti fruktarbojn kaj bredi bestojn.

Dum la 17-a kaj 18-a jarcentoj, ili fariĝis pli multnombraj. Riĉaj gotenburgoj plantis ĝardenojn kaj malgrandajn parkojn, konstruis pavilonojn kaj fotigis sin en siaj somerdomoj kun vido al la rivero.

Kun la tempo, la rolo de la landerioj ŝanĝiĝis de porvivaĵo al distro. Ili fariĝis la pulmoj de la urbo, trankvilaj lokoj kie oni povis aŭdi la venton en la arboj kaj lasi sian ĉevalon ripozi en la ombro. Dum la 18-a kaj 19-a jarcentoj, ili kreskis en malgrandajn bienecajn posedaĵojn kun fruktoĝardenoj, aleoj kaj ornamaj plantaĵoj. Homoj trinkis kafon en la pavilono, lasis infanojn kuri nudpiede sur la herbo kaj akceptis gastojn kun glasoj da portvino kaj rido.

Sed fine de la 19-a jarcento ĉio ŝanĝiĝis. Kiam la fortikaĵmuroj estis detrinitaj en 1807, Gotenburgo komencis kreski super la landeriaj terposedaĵoj. La sopiro de la urbo pri spaco fariĝis pli granda ol la memoro pri ĝia tero. La malnovaj bienoj estis detrinitaj, vojoj estis konstruitaj, kaj novaj urbodistriktoj ekestis sur ilia tero. La urbopartoj Johanneberg, Bagaregården, Härlanda, Lorensberg, Annedal, ĉiuj portas nomojn de la landerioj, kiuj iam kuŝis tie.

till små herrgårdsliknande egendomar med fruktträdgårdar, alléer och prydnadsplanteringar. Man drack kaffe i bersån, lät barnen springa barfota i gräset och tog emot gäster med portvinsglas och skratt.

Landerierna föddes ur den mark som Kronan skänkte staden 1621, den så kallade donationsjorden. Här fick borgare och köpmän arrendera mark, bygga hus, plantera fruktträd och hålla djur. Under 1600- och 1700-talen blev de allt fler. Förmögna göteborgare anlade trädgårdar och små parker, byggde lusthus och lät sig fotograferas i sina sommarvisten med utsikt över älven.

Men under slutet av 1800-talet förändrades allt. När befästningsmurarna revs 1807 började Göteborg växa ut över landerimarken. Stadens hunger efter plats blev större än minnet av dess jord. De gamla gårdarna revs, vägar drogs, och på deras marker reste sig nya stadsdelar.

Johanneberg, Bagaregården, Härlanda, Lorensberg, Annedal, alla bär namn från de landerier som en gång låg där.

Och när man hör namn som Kristinelundsgatan, Carlandersplatsen, Levgrensvägen eller Waterlooatan, anar man

Kaj kiam oni aŭdas nomojn kiel Kristinelundsgatan, Carlandersplatsen, Levgrensvägen aŭ Waterlooogatan, oni sentas eĥojn de la bienoj, kiuj iam estis kaŝitaj en verdaĵo.

Kelkaj spuroj ankoraŭ restas, kiel fragmentoj de perdita pejzaĝo.

Ĉe Liseberg, la malnova ĉefa konstruaĵo ankoraŭ staras, kaŝita inter la zumo de la amuzparko, sed kun sia animo sendifekta. Stora Katrinelund, kun siaj klasikaj proporcioj kaj historia fasado, hodiaŭ estas listigita konstruaĵo.

En Johanneberg oni ankoraŭ povas senti la formon de la malnova ĝardeno, kaj en Bagaregården la grandbieno el la 18-a jarcento restas, kiel vivanta memoro pri la tempo kiam la urbo ankoraŭ kreskis el la tero.

Estas pli: Kvibergsnäs, Ånäs, Carlsberg, Lorensberg, Götaberg, lokoj kiuj iam pulsas de vivo kaj laboro, nun kaŝitaj sub stratoj kaj kvartaloj, sed kies nomoj restas kiel memorpunktoj en la ŝtofo de la urbo.

La beleco estas, ke la spuroj ankoraŭ vivas. Ne kiel muzeo, sed kiel silentaj korbatoj en la urbopejzaĝo.

Kurbo en strato. Pordegfosto, pri kiu neniu pensas. Arbo kreskanta kie iam staris ĝardeno.

Ĉio ĉi estas restaĵoj de tempo, kiam Gotenburgo estis urbo en ĝardeno.

Do la venontan fojon, kiam vi promenos tra Gotenburgo, haltu momenton.

Eble vi staras sur la tero, kie iam estis unu el la bienoj de la urbo.

Eble vi ankoraŭ povas aŭdi la venton en la fruktarboj, kiuj iam estis plantitaj tie, kiam la urbo estis juna kaj la mondo estis pli malrapida.

Fonto: Raporto pri Kultura Medio 2018:01 – Landerierna. Vizito pri Kultura Medio Gotenburgo plifortigita: la landerioj.

Urbomuzeo de Gotenburgo, Kultura Administracio, Marto 2018.

ekon av de ĝardenoj kiel en la ĝangalo inbäddade i grönska.

Några spår finns ändå kvar, som fragment av ett förlorat landskap.

Vid Liseberg står ännu den gamla huvudbyggnaden kvar, dold bland nöjesparkens sorl, men med sin själ intakt. Stora Katrinelund, med sina klassiska proportioner och anrika fasad, är i dag byggnadsminne.

I Johanneberg kan man ännu ana den gamla trädgårdens form, och i Bagaregården står manbyggnaden från 1700-talet kvar, som ett levande minne av den tid då staden ännu växte ur jorden.

Det finns fler: Kvibergsnäs, Ånäs, Carlsberg, Lorensberg, Götaberg, platser som en gång pulserade av liv och arbete, nu dolda under gator och kvarter, men med sina namn kvar som minnespunkter i stadens väv.

Det vackra är att spåren fortfarande lever. Inte som museum, utan som tysta hjärtslag i stadsbilden.

En kurva i en gata. En portstolpe som ingen tänker på. Ett träd som växer där en gång en trädgård låg.

Allt detta är rester av en tid då Göteborg var en stad i trädgården.

Så nästa gång du går genom Göteborg, stanna upp en stund.

Kanske står du på marken där ett av stadens landerier låg.

Kanske hör du ännu vinden i fruktträden som en gång planterades där, när staden var ung och världen långsammare.

Källa: Kulturmiljörapport 2018:01 – Landerierna. Kulturmiljövision Göteborg förstärkt: landerierna.

Göteborgs stadsmuseum, Kulturförvaltningen, mars 2018.

Göteborgs landerier – spår av en förlorad grön stad.

La Gotenburga landerioj – spuroj de perdita verda urbo

Du ekrigardoj al la historio de Gotenburgo, prenitaj el la malnovaj bienoj de la urbo.

La unua bildo montras la panelon Marieholm el la malfrua 17-a jarcento, pentritan panelon trovitan kiel tegmenttabulojn dum la malkonstruo de la bieno Marieholm en Gamlestaden en 1938. Parto de la panelo nuntempe estas montrata en la ekspozicio "La Naskiĝo de Gotenburgo" ĉe la Urba Muzeo.

La dua pentraĵo prezentas la bienon Hedås sur Södra vägen, kun ĝia tabakplantejo kaj grandiozaj loĝdomoj. La akvarelo estis pentrita de Carl Blidberg kaj estas konservita en la arkivoj de la Urba Muzeo.

Kune ili rakontas la historion de la tempo kiam Gotenburgo estis urbo en la ĝardeno, pri bienoj, fruktaroj kaj homoj kiuj vivis proksime al la tero kie nia urbo kreskis.

Foto: Urba Muzeo de Gotenburgo, Raporto pri Kultura Medio 2018:01 – Bienoj kaj arkivoj de la Urba Muzeo de Gotenburgo (panelo Marieholm kaj kolekto de Carl Blidberg).

Två glimtar ur Göteborgs historia, hämtade från stadens gamla landerier.

Den första avbildningen visar

Marieholmspanelen från slutet av 1600-talet, en målad panel som påträffades som takplankor vid rivningen av landet Marieholm i Gamlestaden 1938. En del av panelen visas idag i utställningen Göteborgs födelse på Stadsmuseet.

Den andra målningen föreställer landet Hedås vid Södra vägen, med sitt tobaksplantage och pampiga bostadshus. Akvarellen är målad av Carl Blidberg och bevarad i Stadsmuseets arkiv.

Tillsammans berättar de om den tid då Göteborg var en stad i trädgården, om gårdar, fruktträd och människor som levde nära marken där vår stad växte fram.

Foto: Göteborgs stadsmuseum, Kulturmiljörapport 2018:01 – Landerierna samt Göteborgs stadsmuseums arkiv (Marieholmspanelen och Carl Blidbergs samling).

